
# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 6 (957) • 2022 •

DIA REGNO

ISSN 0167-9554



Ĉi tiu fresko de Taddeo Gaddi en la Baziliko de Santa Croce, Florenco estis pentrita inter 1332 kaj 1338.

La anĝelo kaj la paŝtistoj

Luko 2, 8-14

**KELI**

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe Cousson
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel Polnický;
✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
✆ +420 723 672 335;
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto**: Ágnes Ráczkevy-Eötvös
✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

**DIA REGNO**

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof Åradsson
✉ Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Pavel Polnický

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel Polnický
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## Enhavo

| | |
|---|---|
| "Mi, ni, ili kaj Dio" | 123 |
| Ni kaj Ili | 128 |
| Kiu scias pri morgaŭ? | 131 |
| Holodomoro | 132 |
| Preĝi por la mortintoj? Ne! – Kial ne? | 134 |
| Poemo: Morto | 139 |
| Pri la KELI-insigno | 140 |
| Kongresurbo 2023 – Bjalistoko | 141 |
| KAVA-PECH (pli ol) 30-jara | 142 |
| Libro: Atributoj de apostoloj kaj evangeliistoj | 143 |
| Aperis jam la stel' matena | 144 |

## Redaktoraj vortoj

Kara leganto, la kristnaskaj festotagoj staras antaŭ nia pordo. La helpokrioj de helporganizoj, por iom mildigi la problemojn de suferantaj homoj, ĉi-jare estis eĉ pli multaj ol kutime. Milito en Ukrainio, inundo en Pakistano, sekeco en Somalio por mencii kelkajn katastrofojn, kiuj tuŝas bazajn homajn bezonojn. Kaj hejme ni vidas homojn, kiuj suferas sub altaj manĝoprezoj, ĝenerala inflacio kaj malkreskantaj monrimedoj.

Ni ĉiuj vivas en niaj propraj cirkonstancoj kun niaj bezonoj. Samtempe eble eblas ke ni, niamaniere, kapablas iom helpi al tiuj, kiuj vivas en tre severaj kondiĉoj. Ni serĉu eblecojn!

Ĉiukaze – belan kristnaskofeston kaj bonan finon de 2022!

Bono farita ne estas perdita.
Bezono estas plej forta ordono.
Zamenhofaj proverboj

Ni pensu pri la ukrainoj!

# “Mi, ni, ili kaj Dio”

## Tria prelego dum la kongreso en Domaszék, julio 2022

Philippe Cousson, FR

Post konsideroj pli ĝeneralaj (vidu Dia Regno 4/2022 kaj 5/2022), mi alvenas al bibliaj kaj teologiaj konsideroj pri identeco, pri kiu mi estas, pri kiuj estas ni, pri kiuj estas ili.

### Mi

Kiam mi metas la demandon: Kiu mi estas?, vi komprenas ke fakte, la demando estas: Kiu mi estas en vero?

Ĉu do la vero troviĝas en tio, kion mi sentas, ĉu en miaj impresoj, ĉu en tio, kion mi montras?

Ĉu la vero troviĝas en tio, kion diras al mi la aliaj, kion diras pri mi la aliaj, ĉu en tio, kion mi interpretas el iliaj reagoj?

Nur unu scias kiu mi estas, kaj tiu ne estas mi. Nur unu konas min eĉ pli ol mi mem. Tiu estas Dio.

La tuta 139a psalmo diras, klarigas tion. Mi insistos pri la du lastaj versikloj.


La preĝo de la psalmisto estas ĝuste la deziro esti konata de Dio.

“Esploru min, ho Dio, kaj konu mian koron. Provu min, kaj sciu miajn pensojn.”

La lasta vorto temas pli precize pri miaj zorgoj. Ĉu tio rilatas al la 4 antaŭaj versikloj, malfacile kompreneblaj por ni hodiaŭ, interpretendaj? Certe, la ĉirkaŭanta malbono ĉirkaŭ li ribeligas la aŭtoron, skandaligas lin. Li tamen lasas al Dio la agon en versiklo 19. Eble tra tiuj diraĵoj ĝis versiklo 22, li sukcesas reteni sin kaj lasi sian koleron en la mano de Dio. Tamen la zorgo restas. Kaj ankaŭ tiun zorgon, Dio ekkonu, aŭ pli ĝuste jam konas.

“Kaj rigardu, ĉu mi estas sur malbona vojo, kaj gvidu min sur la vojo de eterneco.”

Tiu malbona vojo estas fakte vojo de peno, de strebo. Estas la vojo kie mi iras, mi strebas, mi penas, mi provas per mi mem, per miaj streboj, kie mi mem volas esti mi, plenumi min mem. Kaj mi ne



Philippe Cousson prelegas en Domaszék.
Fotis B Åradsson

kapablas ekkoni ke mi iras tiun vojon. Mi bezonas ke Dio rigardu kaj indiku ke tiun vojon mi ne iru, ke ĝi ne respondas al kiu mi vere estas.

La vojo de eterneco: temas ĉi tie pri tiu grava vorto עוֹלָם (`olam) en la hebrea kaj αἰων (aiôn) en la greka, kiu signifas kaj tempon kaj mondon, daŭron kaj eternecon, ne la nunon sed la tempon de Dio. La nunaj streboj ne validas por scii kiu mi estas, nur en la tempo kaj la realo de Dio mi povas esti mi mem.

Estas Dio kiu scias, kiu diras, kiu mi estas.

En preĝo, en meditado de la Skriboj, oni povas ricevi de Dio nian veran memon. Legado de la Psalmoj estas unu el tiuj vojoj de malkovro, de ricevo de tiu identeco, ĉar la Psalmoj kolektas la spiritan vivon de multaj, kaj parolas al ĉiu. En ili oni lernas pri Dio sed ankaŭ pri si mem.

> Kiun ni agnoskas aparteni al *"ni"*? Kaj kiun ne?

## Ni

Kiuj ni estas, aŭ pli ĝuste, kiuj estas *"ni"*.

Mi nune parolos pri ni, kristanoj. Kiamaniere ni parolas pri ni. Kiun ni agnoskas aparteni al *"ni"*? Kaj kiun ne? Ni rapide vidos ke ni ne povas apartigi, distingi, ekskludi.

Mi apogos mian aserton per kvar konataj versikloj, el kiuj la lasta, kiu estas la moto de ĉi tiu kongreso.

*1 Kor 12,13: Ĉar en unu Spirito ni ĉiuj baptiĝis en unu korpon, ĉu Judoj aŭ Grekoj, ĉu sklavoj aŭ liberaj; kaj ĉiuj estas trinkigitaj el unu Spirito.*
*Gal 3,28: Ne estas ja Judo nek Greko, ne estas sklavo nek liberulo, ne estas ja vira kaj virina; ĉar vi ĉiuj estas unu en Kristo Jesuo.*

En tiuj versikloj de Paŭlo, oni povas kompreni ke la Spirito ne atentas pri la origino, pri la socia statuso, pri la sekso. La proklamo de la graco de Dio koncernas ĉiujn homojn, kiuj ajn ili estas. Kaj tion pruvas la fakto ke la Spirito estas donita al ĉiu kredanto,

*Ago 15,8-9 Kaj Dio, kiu konas la korojn, atestis al ili, donante al ili la Sanktan Spiriton tiel same, kiel al ni; kaj Li faris nenian diferencon inter ni kaj ili, per la fido puriginte iliajn korojn.*

Se la Spirito faras neniun diferencon inter la judoj (ĉi tie "ni") kaj la ne-judoj (ĉi tie "ili"), same en niaj rilatoj, ni ne devas fari diferencon kun la homoj kiujn ni renkontas.

## Ili

Nun, ni do alvenas al la tuta homaro.

Mi unue citos la tutan 8an psalmaron. Ĝi estas laŭdo al Dio pri la kreitaro. Ĝi priskribas la lokon de la homo ene de tiu kreitaro.

*2 Ho Eternulo, nia Sinjoro,*
*Kiel majesta estas Via nomo sur la tuta tero! –*
*Vi levis Vian gloron super la ĉielon.*
*3 Per la buŝo de junaj infanoj kaj suĉinfanoj*
*Vi fondis al Vi potencon kontraŭ Viaj malamikoj,*
*Por kvietigi la malamikon kaj la venĝemulon. –*

*4 Kiam mi rigardas Vian ĉielon, la faron de Viaj fingroj,*
*La lunon kaj la stelojn, kiujn Vi estigis:*
*5 Kio estas homo, ke Vi lin memoras?*
*Kio estas homido, ke Vi pensas pri li?*
*6 Vi malaltigis lin malmulte antaŭ Dio;*
*Per honoro kaj beleco Vi lin kronis.*
*7 Vi faris lin reganto super la faritaĵoj de Viaj manoj;*
*Ĉion Vi metis sub liajn piedojn:*
*8 Ŝafojn kaj bovojn ĉiujn*
*Kaj ankaŭ la sovaĝajn bestojn,*
*9 La birdojn de la ĉielo kaj la fiŝojn de la maro,*
*Ĉion, kio iras la vojojn de la maroj. –*
*10 Ho Eternulo, nia Sinjoro,*
*Kiel majesta estas Via nomo sur la tuta tero!*

Ĉi tie estas proklamata la digneco de la homo, pro la fakto ke li estas kreita de Dio. Krome, kiel bildo de Dio, li estis kreita. La homo estas "*imago Dei"*.

*Genezo 1,27: Kaj Dio kreis la homon laŭ Sia bildo, laŭ la bildo de Dio Li kreis lin; en formo de viro kaj virino Li kreis ilin.*

## Ni ĉiuj estas kunhomoj

Ni ĉiuj estas kunhomoj, bela Esperanta vorto, kiu ne ekzistas en multaj lingvaj.

Ĉi tiu nocio de kunhomeco estas preskaŭ sama kiel la afrika bantua nocio de *"ubuntu"*. Ĝi naskiĝis en Sudafriko. Ĝi estis portata de Nelson Mandela kaj Desmond Tutu, tiu lasta, anglikana episkopo, kiu ligis ĝin ĝuste al tiu fakto ke la homo estis kreita en bildo de Dio. Tiu *"ubuntu"*, kiun oni povus traduki simple per "homeco" havas pli larĝan signifon, kiu povas riĉiĝi laŭ ĝia formo en la diversaj bantuaj lingvoj.

Ĝi estas ankaŭ resumebla per formuloj, atribuitaj al Desmond Tutu:

*Mi estas tiu, kiu mi estas ĉar vi estas tiu, kiu vi estas.*

aŭ

*Mi estas tio, kio mi estas dank'al tio, kio ni estas ĉiuj.*

kaj

*Ni povas esti homaj (aŭ liberaj) nur kune.*

Ni, homoj konsistigas komunumon, koinonion. Kutime, ĉi tiu termino estas teologia kaj rilatas al la Eklezio, sed oni povas apliki ĝin al la tuta homaro.

Tion proklamas la Torao, longe antaŭ la Nova Testamento, en Levidoj 19, Estas interese rigardi la terminojn elektitajn.

Mi citas, per propra traduko: versikloj 17 kaj 18: *Ne malamu vian fraton*. Pli poste: *Vi avertos vian sampopolanon*. Kaj fine: *vi amos vian proksimulon,* aŭ pli ĝuste *vi amos por via proksimulo.*

Kaj en versiklo 34: *Vi amos la enmigrinton en vian landon ĉar vi estis enmigrinto en la lando Egipta*.

Tiu serio de vortoj kovras ĉiujn homojn ĉirkaŭ ni, la fraton, poste la sampopolanon, poste la proksimulon, kiu ajn li estas, kaj ankaŭ la enmigrinton, tiun fremdulon, kiu loĝas inter vi. Mi eĉ uzos

la parabolon de la bona Samariano, vi fariĝu la proksimulo de ĉiuj el ili, sen ia ajn konsidero.

## Kristanoj en la socio

La kristanoj estas, troviĝas en la ĝenerala socio. Ili partoprenas en la kulturo. Ili influas ĝin kaj estas influitaj de ĝi. Per la kulturo ili ankaŭ dissemas sian vidon pri la mondo. La fido videblas en la kulturo, en la konduto de la kristanoj. Certe estas ligoj inter la fido kaj la kulturo.

Sed, ne estu ligoj inter fido kaj politiko. *Ni estas en la mondo, sed ni ne estas el la mondo*.

> Nia vivo, tio estas nia identeco, tio estas nia vero, kaŝiĝas en Kristo.

Kristanoj ne povas, ne devas regi la mondon. La "kristana mondo" ne ekzistas. Eĉ kiam ĝi ekzistis, ĝi ne estis envere esence kristana, sed rimedo por la regantoj.

Regado de lando, de socio, postulas kompromisojn, perfidojn. Ne estis ĉiam belaj la periodoj kiam regantoj proklamis sin kristanoj.

Kristana politika totalismo estus monstro. Domina teologio aŭ dominionismo estas tiu ideo ke la kristanoj estus pli bonaj regantoj. Sed fakte, tiu ideo estas uzata de politikistoj por la propra profito.

Estas en la franca tre interesa libro de Jacques ELLUL, kiu nomiĝas LA SUBFOSADO DE KRISTANISMO [fr: *La subversion du christianisme*]. Ĝi priskribas kiel tra la historio kristanismo estis utiligata de regantoj.

Neniam ekzistis vera kristana regno, nacio. Fakte tia situacio estus terura obstaklo al atesto, al proklamo de la Regno de Dio. Naciismo, eĉ kiam ĝi diras sin "kristana" havas neniun rilaton kun la Evangelio, kun la Regno de Dio.

La Regno de Dio estas *justeco kaj paco kaj ĝojo en la Sankta Spirito* (Rom 14:17).

La Regno de Dio estas servo, amo, preĝo kun la celo partopreni en riparo de la mondo (tikun-olam תִּקּוּן־עוֹלָם) kiam la regnoj de la mondo funkcias en ekvilibro de potenco, kaj/aŭ de supra potenco al suba potenco. Tute alia logiko.

De trista memoro estas la uzo de la nomo de Dio eĉ sur la soldataj uniformoj: *Dio kun ni* [ge: *Gott mit uns*]. Tiam oni revenas al la aliaj demandoj: kiuj estas tiuj "ni". Se Dio estas kun ni, ĉu la diablo estas kun la aliaj. Ĉu ne pli verŝajnas, ke ĉar la Satano estas mensogisto de la komenco, ke li estas kun tiuj, kiuj pretendas kuniri kun Dio. Nuntempe, la ideologio de la rusa mondo [ru: *ruskij mir* русский мир] estas portata per la sama mensogo, ke Dio estas kun ili kaj ke ili defendas la fidon. Ortodoksaj teologoj publikigis tekston, kiu denuncas tiun ĉi ideologion, ĝiajn kontraŭdirojn kaj ĝiajn konsekvencojn.

Al la laŭdire kristanaj regantoj ne

aperas la kontraŭdiro inter la kruco kaj la glavo.

Ĉu ekzistas "justa milito". Tio estas de longe morala diskuttemo. Mi ne estas sufiĉe akra en filozofio, sed mi tamen povas aserti, ke ne ekzistas kristana justa milito, krom se oni parolas pri la bataloj de la Savarmeo, kiu batalas kontraŭ la mizero per *supo, sapo kaj savo*.

Dio parolas pri amo, Dio amas. Liaj sekvantoj, liaj vokitoj, parolas pri amo, predikas pri la Dia amo, servas pro la Dia amo. Tio estas ilia batalo, ilia milito. Ne kontraŭ homoj ili batalas, sed kontraŭ la fortoj de malamo, de malbono, de malfeliĉo.

La Evangelio ne estas kondamno, sed proklamo de pardono, de graco, alvoko al frateco, al kunhomeco, al *ubuntu*. Kaj tio estas por ĉiuj, sen distingo, sen diferenco.

En la Eklezio, oni estas akceptata. Ĝia identeteco estas inkluziva kaj ne ekskluda. La alvoko estas por ĉiuj. La akceptado estas la universala karaktero de la Eklezio. Aŭ devus esti. Sed foje la Eklezio erarvagas. Ankaŭ ĝi devas esti elprovata de Dio, por vidi ĉu ĝi estas sur malbona vojo.

Mi volas reveni finante al la unua demando: kiu mi estas? Kio estas mia identeco? Paŭlo en Koloseanoj 3:2-4:

*2 Atentu tion, kio estas supre, ne surteraĵojn. 3 Ĉar vi mortis, kaj via vivo kaŝiĝis kun Kristo en Dio. 4 Kiam aperos Kristo, nia vivo, tiam vi ankaŭ kun li aperos en gloro.*

Nia vivo, tio estas nia identeco, tio estas nia vero, nia vivo kaŝiĝas en Kristo.

En Apokalipso, en la letero al la Eklezio de Pergamo, oni diras (2:17):

*Al la venkanto mi donos el la kaŝita manao, kaj mi donos al li blankan ŝtoneton, kaj sur la ŝtoneto novan nomon skribitan, kiun konas neniu krom la ricevanto.*

Tiu nova nomo estas mia vera identeco, mia vera mi mem. Ĝin mi ricevos de Dio.

## Konklude

Post tiuj prezentoj, mi deziras ke estu pli klara al vi kiu vi estas, kaj kiu konas vian *mi*-on, vian memom, kaj ke vi ne plu eraru pri tiu, kiu vi estas.

Mi ankaŭ deziras ke via "*ni*" ne plu estu ekskluda, ke la alia, ĉiu alia, havu lokon en viaj *ni*-oj, ke vi dividu kun ĉiu, eĉ tute fremda al via kulturo, la saman homecon.

Mi ankaŭ deziras ke tiu "*ili*" ne plu estu la "tria" gramatika persono, fremda, fora, malsama, timenda, sed tiu kun kiu vi estas kunhomo.

Mi ankaŭ deziras ke neniu plu pro vi sentu sin aliigita.

La Spirito *faris nenian diferencon inter ni kaj ili.*

Ni ĉiuj faru same.

Mi dankas

# Ni kaj Ili

## Prelego dum la kongreso en Domaszék, julio 2022

Bengt Olof Åradsson, SE

Homoj formas sian percepton pri la mondo – sian ”mondbildon” – surbaze de propra grupa aparteno, sia proksimeco.

Ĉi tio ofte kaŭzas tension inter “NI kaj ILI” kaj baziĝas sur diversaj homaj reagoj al similecoj kaj diferencoj.

Ĉi tiuj reagoj ĉiam ĉeestas sendepende de la temo, ĉu temas pri etneco, seksaj roloj aŭ orientiĝoj, sociaj grupiĝoj, klimatoŝanĝiĝo aŭ aliaj.

Problemo aperas kiam iu el la propra grupo provas krei bildon pri iu el la alia grupo. Kiuj konceptoj kaj konvencioj regas la konduton en la renkontiĝo inter reprezentantoj de ĉi tiuj grupoj? Ĉu ni/vi troviĝas en malsamaj ”mondoj”? Ĉu ekzistas manieroj krei ponton aŭ malgrandigi la distancon inter nia propra grupo kaj la aliaj?

La fenomeno, nomita “NI kaj ILI -sindromo” estas karakterizita per:



Bengt Olof Åradsson dum la kongreso.
Fotis O. Fischer

- forta sento kaj konscio pri la diversaj identecaj variabloj de la *propra* grupo, kaj samtempe
- la kono pri “la aliaj” estas relative malabunda kaj tiam la risko estas granda, ke mitoj kaj antaŭjuĝoj pri “la aliaj” formiĝas kaj diferencoj inter NI kaj ILI fortiĝas.

Konvencioj povas gvidi nian konduton sen nia konscia pripenso. La ĉiutaga vivo fariĝas al ni tiel evidenta, ke ni malfacile vidas la aferon el alia vidpunkto, ekz: kial nordo ĉiam estas supre sur la terglobo? Kiu decidis tion? Kial la nula meridiano estas la deirpunkto por tempzonoj kaj niaj mapbildoj?

Ne estas naturaj leĝoj, nur konvencioj.

### Kio formas nian grupon

Pluraj aĵoj formas nian propran grupon kaj samtempe estigas la limojn rilate al aliaj grupoj. Inter ili la sekvaj:

**Lingvo**. Tio povas esti nacia lingvo, kiel la sveda. Povas temi ankaŭ pri specialaj teknikaj terminoj de diversaj grupoj – komputilistoj, ekologoj, socialistoj, kuracistoj, laborhundaj klubanoj, instruistoj, ktp.

**Nomoj** povas krei bredejon por la sento “ni kaj ili”. Homoj ordigas unu la alian laŭ nomoj. Se la nomo sonas fremda, estas facile konstati, ke la alia persono ne estas kiel ni, ekz. en Svedio personoj kun “ne-svedaj” nomoj pli malfacile estas dungitaj.

**Uniformo** (simileco en vestaĵoj “*dress*

*code*”) kreas senton de unuformeco kaj NI-senton. Ĉiu profesio havas sian uniformon kaj ĉiu subkulturo portas siajn proprajn ”uniformojn”, ekz sportaj ŝatantoj donas klarajn signalojn de kluba aliĝo.

**Simboloj** kunligas homojn. Io, kio montras la apartanecon politike, kulture, etne, religie, ktp. La naciaj flagoj kaj koloroj estas oftaj simboloj ĉe sportaj eventoj. Esperanto-stelo!?

**Ritoj kaj ceremonioj.** Ĉiu grupo havas siajn proprajn “ritojn” kiuj apartigas ilin de aliaj. La svedoj havas siajn naciajn ritojn, finnoj siajn, norvegoj siajn. La ceremonioj kunigas la grupojn. Tio inkludas diversajn festojn, ekz. sveda somermeza festo kaj la “devo”/kutimo vidi la tradiciajn kristnaskajn Disney-filmetojn.

**Konduto**. Tiuj, kiuj alimaniere agas ofte ricevas la grupon kontraŭ si. Ni ĉiuj havas ideon pri kiel ni devus konduti laŭ kelkaj neskribitaj reguloj. Ni permesas variadojn ene de nia propra grupo. Sed ekster nia grupo ni tuj atentas pri la devioj.


**Valoroj**. Ĉiu grupo estas regata de fiksaj valoroj. Plej multaj el tiuj devas esti dividitaj se vi volas aparteni al grupo. Foje komuna malamiko povas kunligi grupon pro la simpla kialo, ke vi havas la saman malamikan bildon.

**Normoj**. Ĉiu socio estas subtenata surbaze normoj kaj etiko. Ĉi tio validas ankaŭ por grupoj. Se vi ne sekvas ĉi tiujn (foje neskribitajn) regulojn, tuj estos diskuto. Kiam grupo spertas ŝanĝiĝon, ĝuste la normoj kaj etikoj estas plej vigle diskutataj.

**Teritorio**. Ĝi komenciĝas per la hejmo, poste la strato, poste la vilaĝo, poste la municipo. Ĉiu grupo havas limon kiu montras kio estas interne aŭ ekstere. Kaj ĉi tiuj limoj estas defendataj.

**Kulturo**. Tio, kion ni perceptas kiel kulturo, estas tio, kio estas komuna al la grupo. Ĝi povas enhavi ĉiujn tie ĉi menciitajn faktorojn. Ĝi povas temi ankaŭ pri muziko, danco, literaturo, arto k.t.p.

**Historio**. Ĉiu grupo havas sian propran historion, kiu estas transdonata al



estontaj generacioj, ekz. sportaj atingoj. Gravaj kaj negravaj eventoj plifortigas la identecon de la grupo.

**Herooj**. Ĉiu grupo havas siajn heroojn kaj kultajn figurojn, kiuj estas laŭdataj kaj ŝatataj. Ĉi tiuj estas gravaj por la memestimo kaj fiero de la grupo. Svedaj herooj kiel Strindberg, Karl XII, Ingemar Stenmark, ABBA k.a. donas al ni ion pri kio fieri.

**Krimuloj**. Ĉiu grupo lernis vivi kun siaj krimuloj – kiuj ankaŭ estas ŝatataj en ia speciala maniero. Ni permesas ilin esti kun ni. Ili estas individuoj, kiuj donas al ni ion por priparoli.

Sed ve al ”ILI" se ili havas fiulojn ene de sia grupo! Tiam ni vidas la tutan grupon kiel fiuloj. En ”ILI", individua konduto iĝas tipa por la tuta grupo. Jen, tie ĉi estiĝas la vere danĝera “ni kaj ili”-sinteno: Iliaj “kulpuloj” konfirmas nian opinion pri la aliaj – kiom “malbonaj” ili estas.

Ĉiuj ĉi tiuj faktoroj formas nin esti ”NI”. Ene de la grupo evoluas nia identeco, sekureco, kreemo kaj defendo. Ni kuraĝas esti aktivaj. Ni kuraĝas esti ni mem. Ni ankaŭ permesas al ni esti malsamaj. Malgraŭ ĉiuj tiuj diferencoj, ni estas ”NI”.

Pri “ILI” ni facile adoptas observantan sintenon — iom malproksime, iomete mirante kaj demandante, iom maltrankvile pri la sekvoj de ilia entrudiĝo en nian teritorion.

Kion ni vere scias estas nur ke ili ne estas kiel “ni”. Iliaj identecaj variabloj estas kontraste al niaj. “Ni estas tia, ili ne estas”.

Ni ne vidas ilin kiel individuojn sed kiel “kolektiva ILI”. Ĉiu homogena grupo konsideras aliajn grupojn kiel ”ILI-grupojn”.

En grupo povas estiĝi subgrupoj “NI” kaj “ILI”, kie kutime la plimulto formas la ”NI” kaj la malplimulto, la aliaj, fariĝas aŭtomate la ”ILI”-grupo.

La malplimulto kutime devas lerni adaptiĝi al la ĉirkaŭa plimulta kulturo. Ili ja iamaniere ankaŭ apartenas al ni – eble loĝas en la sama urbo, lando, studas en la sama lernejo aŭ simile.

### Kion ni povas fari

Nia tasko estas provi nuancigi la tension inter “ni” kaj “ili”. Krei dubon pri eldiroj se ni renkontas simpligojn aŭ mitojn. Agnoski ke la vivo ne estas tiel simpla, kiel ni foje supozas aŭ volas kredi.

Ni devas bari ke la simpligo de la mondo en kontraŭaj polusoj – bono kontraŭ malbono, blankuloj kontraŭ nigruloj k.t.p. – enradikiĝas en la socio kaj tiel malhelpas komunikadon inter diversaj grupoj.

**La Spirito *faris nenian diferencon inter ni kaj ili***

# Kiu scias pri morgaŭ?

*Karaj,*

*Jen Biblia vorto dum novembro 2022. En la islama mondo oni ofte uzas la esprimon "inŝalah" (se Allah volas). Ankaŭ inter kristanoj estis pasintece kutimo uzi similan frazon. Nuntempe estas tre malofte, ke en Eŭropo aŭ Ameriko oni aŭdas iun diri "se Dio volas". Ĉu ni fariĝis tro memfidaj pri nia povo stiri la eventojn de nia vivo kaj en la mondo? Tamen la monda situacio klare montras, ke la malgrandaj dioj de ĉi-mondo ne kapablas. Pli bone estus fidi al Dio kaj lasi Lin agi.*

*Sincere,*
*Jerald Veit*

*

Atentu nun vi, kiuj diras: Hodiaŭ aŭ morgaŭ ni iros al tiu urbo kaj restos tie unu jaron kaj negocados kaj profitos; kvankam vi ne scias, kio morgaŭ okazos. Kio estas via vivo? Vi ja estas vaporo, kiu mallongan tempon montriĝas kaj poste malaperas. Anstataŭ diri: Se la Sinjoro volos, ni vivados kaj faros ĉi tion aŭ tion.

(Jakobo 4:13-15)

---

## Ĝojplenan kristnaskan feston & Sukcesan novan jaron

al ĉiu leganto de Dia Regno deziras
la sekretario & distribuanto kaj la redaktoro

Pavel POLNICKÝ &
Bengt Olof ÅRADSSON

# Holodomoro

## Malsatego en Ukrainio dum 1932-1933

El Vikipedio

Holodomoro [ukraine Голодомор в Україні 1932–1933] estis amasa mortado en Ukrainio pro malsatego en 1932 kaj 1933.




Ikono de Holodomoro

Etimologie la termino "holodomor" devenas de la ukraina esprimo "*moryty holodom*", kiu signifas mortigi per malsato.

Pro ideologiaj motivoj sovetiaj aŭtoritatuloj planis kaj realigis unu el la plej grandskalaj genocidoj de civiluloj. En la limoj de la soveta Ukrainio kaj ankaŭ en aliaj lokoj de densa loĝado de ukrainoj, konscie kaj celdirekte, laŭ ordono de la moskva registaro la lokaj gvidorganoj forprenadis ĉiujn nutraĵproduktojn, plejparte grenon. Kiel rezulto de la artefarita malsatego estis ekstermitaj de 7 ĝis 10 milionoj da ukrainoj. La amasa mortado estis kaŭzita ne de naturaj katastrofoj, militagoj aŭ epidemioj, sed de planita genocido fare de komunistoj-stalinanoj. En la jaro 1932 la gren-rikolto estis mez-averaĝa, sed vilaĝanoj en Ukrainio – tiama grenejo de Eŭropo – kontraŭstaris la politikon de Stalin pri kolektivigado. La reprezalioj estis direktitaj kontraŭ ukrainoj kiel etno kaj kontraŭ kamparanoj kiel klaso. Soveta mortigado per malsatigo okazis ankaŭ en Meza kaj Malsupra Volgio, kie ties loĝantaro apogis armeon de Anton Denikin kaj en norda Kazaĥio, kie simile mortis unu miliono da kazaĥoj.



"Ruĝa Trajno" de ĉaroj de la kolektiva bieno en la vilaĝo de Oleksiyivka, Ĥarkova provinco en 1932. "Ruĝaj Trajnoj" prenis la unuan rikolton de la kultivaĵo de la sezono al la registaraj deponejoj. Dum la Holodomor, tiuj brigadoj estis parto de la politiko de la sovetia registaro de forprenado de manĝaĵo de la kamparanoj. /Vikipedio (Holodomor)

La teruraĵojn priskribis Vasil Barka en sia romano "La flava princo" (unu ĉapitro estis esperantigita por Ukraina antologio de Viktor Pajuk).

Holodomoro estis agnoskita de 26 ŝtatoj kiel genocido kontraŭ ukraina popolo. En Ukrainio la kvaran sabaton de novembro oni memorigas viktimojn de Holodomoro. La 28an de novembro 2006, la ukrainia parlamento *Verĥovna Rada* (la unuĉambra parlamento de la respubliko Ukrainio) jure agnoskis Holodomoron de 1932-33 jaroj kiel "genocidon de l'ukraina popolo". Ankaŭ en la leĝo estas dirite, ke malagnosko de Holodomoro estas kontraŭleĝa. La 6an

de decembro pola parlamento, Sejmo, dekretis: “Sejmo de la Respubliko de Pollando, kunigante en doloro kun parencoj de holodomoraj viktimoj, malpravigas la totalisman reĝimon, respondecan pro la genocido”. Monumento al la viktimoj de tiu ĉi kruela genocido troviĝas ankaŭ en Varsovio.

## Nuntempa rigardo al tiel nomata Malsatego

Kiel genocidon en Ukrainio agnoskis ĝin registaroj aŭ parlamentoj de 26 ŝtatoj:

Pollando (2006), Ukrainio (2006), Argentino, Aŭstralio (2003), Azerbajĝano, Kanado (2008), Hispanio (2007), Moldavio, Kartvelio (2005), Belgio, Estonio, Hungario (2003), Litovio (2005), Meksiko (2008), Paragvajo (2007), Latvio (2008), Ĉeĥio (2007), Kolumbio (2007), Usono, Vatikano.

La 23an de novembro 2022, Papo Francisko nomis la Holomodoron genocido, “Ni memoru longe-suferantan Ukrainion. Ĉi-sabate estas la datreveno de la terura genocido de la Holodomoro en 1932-1933 artefarite kaŭzita de Stalino. Ni preĝu por la viktimoj de ĉi tiu genocido kaj preĝu por ĉiuj ukrainoj, la infanoj, la virinoj kaj la maljunuloj, la beboj, kiuj hodiaŭ suferas la martirecon de agreso.”




Afiŝo fare de Leonid Denysenko, Ukrainia-Aŭstralia artisto. Vikipedio: commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=5152693

## Aliaj vidpunktoj pri la Holodomoro

Ekzistas ankaŭ aliaj vidpunktoj pri la Holodomoro:

- La kaŭzo de Holodomoro iĝis malgrandigo de semado en Ukrainio kaj kozakaj regionoj, kio ne okazis en centraj regionoj.
- Eble ne estas ĝuste trakti kiel “kontraŭukraina genocido”-eventojn, pro kiuj mortis ne nur ukrainoj, sed miloj de alietnaj personoj (temas pri tragedio de sovetiaj kamparanoj ĝenerale). Krom tio, la difino de genocido estis aprobita nur en 1948 kaj eble ne funkcias por okazaĵoj de tempo antaŭ tiam.
- Milionoj da homoj pereis dum la malsatego, sed:
  - La malsaton kaŭzis sole la bezono eksporti multe da greno (surfone de malaltiĝo de prezoj por ĝi) por pripagi aĉeton de teknologioj, bezonataj por industriigo de Sovetunio; do la celo estis greno, sed ne morto de kamparanoj;
  - La fakto, ke malsatego estis ekstreme forta en Ukrainio indikas nur troigojn de tiamaj lokaj regantoj;
  - Pro la forpreno de greno iĝis ebla industriigo, kiu kelkajn jarojn poste ebligis venkon super nazia Germanio.

# Preĝi por la mortintoj ? Ne ! – Kial ne ?

## Dialogo inter Philippe Cousson kaj Wolfram Rohloff

(Philippe Cousson)

Tiu demando entenas plurajn aspektojn, la tempo, la morto kaj la postmorto, la preĝo kaj al kiu, preĝi por la mortintoj.

### La tempo

La tempo de Dio ne estas nia tempo, tion ni ja scias. Estas greka vorto kiu entenas tiun ambiguecon, estas αἰων, aiōn, redonita en Esperanto per eono (Same pri la hebrea vorto עוֹלָם, olam), Ĝi estas kaj tempo, erao, ankaŭ eterneco, sed ankaŭ mondo. Ĝi indikas la lokon/tempon, en kiu iu situas, Ni kaj Dio ne situas en la sama eono (aŭ pli ĝuste, li estas ekster — se tiu prepozicio havas tie sencon — la eonoj), tial nia tempo ne estas lia, tial li ne povas esti lokita en domo konstruita de homoj. Tamen, Dio elektis veni, ĉeesti en nian mondon, en nian eonon, per sia Filo. Tiu evento estas same grava kiel la kreado de nia mondo, de nia spaco/tempo. Estis kaj estas diversaj manifestiĝoj de Dio en nia mondo/tempo, sed la veno de Kristo estis enkorpiĝo de Dio, ĉeesto en nia eono. Nia eono, nia mondo, nia tempo estas entute en la menso, en la penso de Dio, eĉ ĉiu el ni, eĉ ĉiu vivpeco.

### La morto kaj la postmorto

La vivo estas fenomeno eble unika en la universo. Kaj la vivo ĉiam havas finon, nome la morton. La tradicia divido de la homa esto estas korpo, animo kaj spirito. Tamen la kompreno estas ofte erare gvidata de (supozata?) greka pensmaniero. Pri la korpo, ni ĉiuj bone komprenas. Pri la animo estas pli komplike. Ĝin priskribas la greka vorto ψυχη, [psyĥē]. Temas fakte pri la menso, la sento esti iu, la psika kapablo, la penso. En kristana penso la animo tute ne estas tio, kio postrestas post la korpa morto. Fakte tiu animo samtempe mortas kiel la korpo. Kio restas, estas la spirito, hebree kaj greke la blovo, donita de Dio, kaj kiu reiras al Dio (Pred 12:7



Wolfram Rohloff. Fotis Václav Pospíšil



Philippe Cousson. Fotis Oldřich Fischer

kaj Luko 23:46). Homo vivas kiam spiras.

La kristana espero troviĝas ne en iu postvivo aŭ senmorteco de la animo, sed en la resurekto, kiam nova korpo (kaj animo) estos donita. Intertempe, se tiu esprimo havas sencon, la spirito estas kun Dio. Ne plu apartenas al nia eono, ne plu intervenas en nia eono. Kaj al la plenumo de la tempoj, de la eonoj, la spirito spertos la releviĝon per novaj korpo kaj animo. Tiun atendotempon (se tiu esprimo ankaŭ havas sencon) bibliaj tekstoj priskribas kiel dormo, ripozo, reiro al Dio. En Joh 14:2, la loĝejoj [gr: *μονη*] estas haltejoj, provizoraj ripozlokoj. Tute ne temas pri la "paradizo". Tiu estos atingita post la resurekto.

## La preĝo kaj al kiu

Preĝo estas spirita konversacio kun Dio. Li parolas al ni per niaj sentoj, per niaj spertoj, sed ĉefe per meditado de la Skriboj. Nia preĝo estas respondo al li, intima aŭ komunuma, voĉa aŭ senvoĉa, vorta aŭ ne vorta. Temas pri laŭdoj, dankesprimoj kaj propetoj, kiuj situas en la diro "ne mia volo sed via volo". Ne eblas havi tian konversacion kun iu alia krom la Triunuo, do kun neniu mortinto, eĉ se ĝi sankte vivis, eĉ kun Maria, kiu same kiel la aliaj estas en atendostato, alieone.

## Preĝi por la mortintoj

Ilia sorto dependas nun nur de Dio al kiu reiris ilia spirito, ni ne plu povas fari ion por ili. Se ni bone konis ilin, ni povas fidi Dion rilate al ili. Preĝi por ili ne havas sencon, estas senutile. Fakte, la sola preĝo kiu povas rilati al la mortintoj, kaj tio estas la kerno de la kristanaj funebraj ceremonioj, estas tiu: danki al Dio pro tio kion Li (Dio) faris tra tiu persono, laŭdi Dion pro tio ke tiu persono estis apud ni, pro tio ke ankaŭ por tiu persono Kristo mortis kaj releviĝis, pro tio ke ties spirito reiris al Dio malgraŭ la fino de la enkorpa vivo. Kaj ĉio ĉi tio en la firma espero de la releviĝo.

---

(Wolfram Rohloff)

Dum en la jaro 523 post Kristo la filosofo Boecio atendis sian ekzekuton, li verkis, sed ne tute finverkis dum tiu mallonga tempodaŭro la lastan filosofian verkon de antikva epoko: KONSOLO DE LA FILOSOFIO[1]. En ties kvina libro la kristanon Boecion zorgigis la demando, ĉu homoj vere povas havi liberan volon, se Dio estas ĉionscianta. Se do Dio ĉion (antaŭ)-scias, kio iam kaj ie ajn okazis aŭ okazas aŭ okazos, ĉu tio ne nepre signifas, ke ĉio per tiu antaŭ-scio de Dio estas antaŭ-destinita?

Boecio respondis tiun logikan problemon per la imago, ke Dio "rigardas" al ĉiu temp-ero el la perspektivo de samtempo. Alivorte por Dio ĉiu temp-ero okazas "nun", tiel ebligante liberan decidon sen Dia antaŭdestino.

Per tiu ekzemplo mi volas indiki, ke ni apenaŭ povas kompreni, kio "estas" tempo, eterno, eterna vivo.

Ni ja ĉi tie meditu pri tiuj aferoj, kiuj superas homan komprenon. Por ni multe pli facilas skizi, kio ekzemple eterna vivo NE estas, ol priskribi pozitive, kio ĝi efektive estas.

Sed tion mi kuraĝis diri: "Eterna vivo" ne signifas senfinan tempodaŭron. Pli

tuŝas min la imago, ke eterna vivo estas vivo ekster ĉiaj limoj de tempo. Pozitive dirite: Mi fidas, ke la limoj kaj limigoj de tempo kaj spaco ne validas "apud" Dio.

## Kio nun al ni homoj okazas mortante?

Inter kristanoj aperas diversaj ideoj, ekzemple:

Post nia morto ni "dormas" kaj ne plu rimarkas tempofluon. Ni "dormos", ĝis kiam Dio revivigos nin korpe, spirite kaj anime. Kelkaj bibliaj kaj duakononaj tekstoj redonas tiun ideon, ekzemple kiam martiro antaŭ sia ekzekuto konfesas al sia murdonto (en la 2a libro de Makabeoj ĉapitro 7, versiklo 14b):

> "*Ni, kiuj mortas pro la manoj de homoj, ni trovas konsolon en la espero donita de Dio,*
> *ke Li revivigos nin denove. Sed vi ne restariĝos al la vivo.*"

Alia de antikva filosofio influita ideo estas, ke (nur) nia animo post morto iros al Dio. Ankaŭ por tia tuja komenco de eterna vivo troveblas iuj argumentoj en la Nova Testamento, ekzemple kiam Jesuo diras al unu el la rabistoj, kiu estas kun li krucumitaj (Luko 23,43):

> "*Vere mi diras al vi: Hodiaŭ vi estos kun mi en Paradizo.*"

La mezepoka teologio provis kombini ambaŭ per la koncepto, ke unue la animo iras al loko pli proksima al Dio kaj poste, en dua paŝo reunuiĝos kun sia resurektita korpo.

En la rakonto pri Lazaro kaj la riĉulo (Luko 16 , 19ss) ŝajne la "tempo" de la mortintoj en Hades respektive en la "sino de Abraham" "paralele fluas" je la "surtera tempo". Tial la riĉulo petas averti siajn fratojn "por ke ili ne venu ankaŭ en ĉi tiun lokon de turmento." (versiklo 28b)

Mi ankaŭ ne volas preteriri la vortojn de Jesuo, kie li indikas, ke la eterna vivo jam nun estas, ekzemple Johano 6,47:

> "*Vere, vere, mi diras al Vi: Kiu kredas, tiu jam havas vivon eternan*"

Rilate al Johano 14 mi opinias, ke la "loĝejoj", kiujn Jesuo preparas por ni, estas pli ol "haltejoj, provizoraj ripozlokoj", sed simbolo kaj bildo por nia nova, eterna hejmo en la domo de nia ĉiela patro.

Do, la Biblio rakontas pri eterno per multfacetaj bildoj. Tiuj ĉiuj unanime konfesas, ke Dia amo superas morton, tempon kaj spacon. Kion Li komencas "nun" surtere, restas eterne. La nekongruaj bildoj rezultas el la fakto, ke pri eterno mankas al ni komprenkapablo: Pri tempo ni scias kalkuli, pri eterno nur paroli per parabolaj bildoj. Se do la Biblio akceptas prezenti diversajn bildojn, ni ne tro serĉu la ununuran prava, sed diskutu, kiu bildo en kiu situacio (mal)pli helpas fidi Dion.

## Kial ni rajtas preĝi — eĉ preĝi por mortintoj?

Unu el la plej grandaj animaj mizeroj de funebrantoj estas la absoluta senpovo fari ion ajn: Vivo finiĝis. Amata homo neniam revenos. Ĉio, kio ne estis solvita dum la vivotempo, neniam solveblos. La morto por ni estas finfinfa fino. Kio do, se persono

ne pardonis al mi aŭ inverse? Se homo mortis sen fido al Dio? Timo, ke amiko, gepatroj, gefratoj, ... perdiĝis por ĉiam, povas fariĝi teruro por funebrantoj.

Tial ne forŝovu la morton el Via vivokoncepto! Morto estas serioza admono al ni vivantoj: Provu trovi pacon, pardonon kaj amon jam dum la vivotempo kaj ne atendu ĝis estas tro malfrue!

Ĉu do preĝoj por mortintoj estas sensencaj aŭ erara psikologia strategio digesti funebron?

Mi konsentas, ke preĝo estas esence konversacio kun Dio. Sed tabuoj kaj timo detruas sinceran konversacion. Tial ni rajtas paroli kun Dio pri ĉio kaj ĉiu, ankaŭ pri mortintoj.

Se do iu ne certas aŭ eĉ timas, ke amata persono ne estas "apud Dio", tiu ne kaŝu sian timon, parolu sen tabuoj, petu kaj preĝu por la amata persono, "tamen plenumiĝu ne mia volo, sed Via. (Jesuo en Luko 22,42).

La unua letero de Johano klarigas:

"*Timo ne ekzistas en amo; sed perfekta amo elĵetas timon, ĉar timo havas turmentegon; kaj timanto ne perfektiĝas en amo.*" (1a Johano 4,18)

La nedubinda amo de Dio al ni permesas ĉiun peton, detruas murojn de tabuoj kaj elĵetas timojn el niaj koroj ebligante kaj kreskigante tiumaniere homan fidon al Dio.

En fruaj tempoj kelkloke kristanoj praktikis la kutimon, esti baptita por jam mortintaj personoj. Ili tiel esperis "helpi" al la forpasintoj. Paŭlo en sia unua letero al Korintianoj mencias tiun kutimon nek subtenante nek kontraŭante ĝin (1a Korintanoj 15,29):

*Alie kion faros tiuj, kiuj baptiĝis pro la mortintoj? Se la mortintoj ne releviĝas, kial do ili baptiĝas pro ili?*

Laŭ la kredkonfeso ni kredas "je la sankta, katolika eklezio, la komunumo de sanktuloj". Tiuj vortoj indikas, ke estas unu eklezio kaj al tiu unu eklezio apartenas kaj homoj surtere vivantaj kaj homoj jam forpasintaj. Eble eĉ oni povus formuli, ke la eklezio konsistas el fidantoj surteraj kaj fidantoj ĉielaj kaj ĝi estas unu eklezio.

Same Paŭlo atendis post sia morto tuj renkonti Kriston, do esti en tiu "ĉiela" branĉo de la eklezio. Tial li eĉ ĝojus morti, por esti tuj apud Kristo, kiel li konfesis al la Filipianoj (1,21ss):

21 *Ĉar ĉe mi la vivado estas Kristo, kaj morti estas gajno.*
22 *Sed se mi vivados korpe, tio signifas pluan frukton de laboro; kaj mi ne scias, kion elekti.*
23 *Ĉar ambaŭflanke mi estas embarasata, havante deziron foriri kaj esti kun Kristo, kio estas multe pli bona;*
24 *tamen mia restado en la karno estas pli bezonata por Vi.*
25 *Kaj tiel fidante, mi scias, ke mi restos kaj apudrestos kun vi ĉiuj, por via progreso kaj ĝojo de fido;*

Pro tiaj motivoj kaj pensoj jam ekde fruaj tempoj, kristanoj ne forgesis mencii mortintojn dum siaj preĝoj, ili dankis kaj petis por ili, konfidante ilin al la amo kaj graco de Dio. Tiun porpetan tradicion la reformacio ne finis, sed purigis: Specialaj datrevenaj diservoj por la animoj de

mortintoj kun pompaj preĝoj kaj oferoj ne necesas. Tiaj tradicioj eble eĉ estus esprimo de timo en nia koro kaj nefido je la amo de Dio.

Sed ni fidu al la graco kaj amo de Dio! Tial ni parolu sincere kun Dio pri ĉiuj ĝojoj, problemoj kaj timoj. Ni ankaŭ parolu kun Dio pri niaj kunhomoj petante kaj dankante por ili.

Kiel tio povas en bona maniero okazi, tion mi volas koncize montri per kelkaj ekzemplaj tekstoj el la oficiala tekstlibro de la Unuigita Evangeli-Luterana Eklezio de Germanio (VELKD)[2] por funebraj diservoj: Komence el kelkaj preĝoj por mortintoj dum funebra diservo:

> Ni parolu sincere kun Dio pri ĉiuj ĝojoj, problemoj kaj timoj

*Eterna Dio, memoru niajn forpasintojn, kiujn ni amis kaj amas.*
*Memoru niajn mortintajn patrinojn kaj patrojn, filinojn kaj filojn, fratinojn kaj fratojn, amikinojn kaj amikojn, kiujn ni ne povas forgesi. Memoru niajn mortintojn, kiujn ni konfidis al Vi.*

aŭ:

*Eterna Dio, komenco kaj celo de nia vivo, ni dankas al Vi pro la vivo de nia mortinta frat(in)o kaj por ĉio, kio riĉigis ties vivon je ĝojo, bono kaj amo, sed ankaŭ je ŝarĝo kaj je provoj.*
*Ni petas Vin:*
*Gvidu la vojon (do: de la mortinto) al la promesita celo, kiun Vi jam komencis kun ŝi/li.*
*Rigardu ŝin/lin en amo kaj pardonu al ŝi/li kaj ni, kie restis ŝuldo kontraŭ Vi aŭ inter ni.*
*Sinjoro, kompatu nin.*
*Helpu al la familio...*

La adiaŭa beno por mortinto:

*Benu vin Dio, la Patro, kiu vin kreis laŭ sia bildo.*
*Benu vin Dio, la Filo, kiu vin per sia suferado kaj mortado savis.*
*Benu vin Dio, la Sankta Spirito, kiu kreis vin sia sankta templo kaj Vin sanktigis.*
*La Triunua Dio ✞[3] estu por Vi gracoplena en la juĝo kaj donacu al Vi la eternan vivon.*

Do, ĉu ni preĝu por mortintoj? Jes, konfidante ĉiujn kaj ĉion en la manojn de nia ĉiela patro!

Jes, ĉar el Dia graco ni saviĝos!

——— Piednotoj

1. Mi ŝatus rekomendi al Vi la esperantlingvan tradukon: Boecio (Boethius): KONSOLO DE LA FILOSOFIO, ellatinigis D-ro Albert Goodheir, Glasgow, Eldonejo Kardo, 1984, ISBN 0 905149 21 1.
2. AGENDE FÜR EVANGELISCH-LUTHERISCHE KIRCHEN UND GEMEINDEN, hrsg. Von der Kirchenleitung der Vereinigten Evangelisch-Lutherischen Kirche Deutschlands, neu bearb. Ausg., Band 3. Die Amtshandlungen, Teil 5. Die Bestattung, Hannover, 1996.
3. Tie ĉi krucosigno super la mortinto. ☙


# *Morto*

*Ĉiu homo havas la devon morti.*
*Ĉiu homo timas morton.*
*Militistoj, ankaŭ la ribeluloj.*
*Kiu konas vian kvaliton kaj vian koloron?*
*Sed kiel eviti vin, forkuri vin?*
*Vi alportas zorgojn, vi alportas larmojn*
*Vi ŝatas malfeliĉojn, vi forprenas iun ajn.*
*Eĉ fiŝoj, kaproj, muŝoj, abeloj;*
*Eĉ floroj, arboj kaj tiuj, kiuj kredas senmortajn;*
*Iru sub viajn akrajn klingojn.*
*Eĉ la prezidentoj garditaj ĝis la dentoj;*
*Sed kiel vi ankaŭ mortigas ilin, do vi estas la plej forta.*
*Mortkondamnitoj sin miras.*
*Ke vi mortigu iliajn ekzekutistojn;*
*Antaŭ ol ni ligu ilin al la elektra seĝo.*
*Mi ne min plu miras pri vi,*
*De tiu, kiu tuj morgaŭ pasos.*
*Mi ne plu timas loĝi antaŭ la tombejo,*
*Sed mi tenas la timon.*
*De la tago, kie vi venos;*
*Kaj kiel!*

Via Honoré SEBUHORO
honsebn@gmail.com

# Pri la KELI-insigno

Siegfried Krüger, DE




Mi ŝatas simbolojn kaj speciale plaĉas al mi la KELI-insigno (vidu ankaŭ Dia Regno 3/2022). Joel Amis, nia iama usona reprezentanto, uzis ĝin sendante leterojn kaj instigis min ankaŭ uzi ĝin kaj nun mi posedas stampilon. Mi ankaŭ memoras, ke kelkaj el niaj virinaj membroj dum niaj kongresoj portis ĝin kiel ornamaĵon, kiu pendas je ĉeneto sur la brusto.

Temas pri la Hugenota Kruco kompletigita per la stelo kaj cirklo. Pasinte ni ja kongresis en Nantes, sed neniu parolis pri tiu kruco, kiu unue estis simbolo por la francaj reformitaj kristanoj kaj nun validas por ĉiuj protestantoj.

Kie estas la origino? Legendo raportas, ke kelkajn jarojn post la nuligo de la edikto de Nantes junaj francaj pastoroj, kiuj ĵus finis la studadon en la franca Svisio, proksime de Lyon estis arestitaj kaj longe pridemanditaj. Ĉar ili ne malkonfesis sian kredon, oni kondamnis ilin kaj mortigis ilin sur brulŝtiparo. Katolika artisto, kiu ĉeestis la ekzekuton, admiris la kuraĝon de la junaj viroj. Li provis kompreni ilin kaj — gajnita por la reformacio — li rakontis al multaj homoj, kion li perceptis en Lyon. Li ankoraŭ aldonis, ke li estis vidinta en la mezo de la kvar brulŝtiparoj kvinan fajron, kiu pli hele flamegis. En ĉi tiu kvina fajro li rimarkis la ĉeeston de Kristo mem, kiu alportis al la ĝismorte fidelaj kristanoj la martiran kronon. Tiu artisto, memorante la okazaĵon, laŭdire kreis la Hugenotan Krucon. Li elpensis kvar duoblajn flamojn, kiuj eliras krucforme centron kaj kiuj je la ekstremaĵoj sin fendas. Ligitaj estas la flamoj per krono.

Ĉu estas li, kiu aldonis en la malsupra parto larmon (simbolo pri la suferoj de la reformitoj) aŭ kolombon (simbolo de la Sankta Spirito)? La legendo ne raportas tion. La Keli-anoj preferis la insignon kun kolombo, kiu laŭ Antoine Court (refondis la reformitan eklezion de Francio post la nuligo de la edikto de Nantes en la jaro 1685) ankaŭ simbolas la "eklezion en la dezerto" laŭ la biblia teksto el la Alta Kanto 2, 14: "Ho mia kolombino, en la krevaĵoj de la roko, en la kaŝejo de la rokkrutaĵo.. ."

La emblemon desegnis Dirk de Boer el Nederlando, kiu estis la unua postmilita sekretario de KELI kaj rekonstruis la organizaĵon post 1945.

Ĉu nia insigno malhelpas la ekumenon? Ekumeno ja ne signifas perdi la identecon kaj ni ne forgesu la mesaĝon de la martiroj. Gvidu nin la Sankta Spirito, kiun simbolas la kolombo, al unueco malgraŭ rita diverseco.

**Kristana kongreso 2023**

72-a Kristana Kongreso de KELI
5–12 de aŭgusto 2023
Bjalistoko – Pollando

# BJALI STOKO



Historia kerno de la urbo. Fotis Slowacki - Propra verko, Publika havaĵo, commons.wikimedia.orgwindex.phpcurid=11473435

La unua skribita noto pri Bjalistoko devenas el 1514. La unuan kortegon verŝajne oni konstruis meze de la XV-a j.c. Ĝi apartenis al Raczko Tabutowicz, al kiu la litova princo Michał Zygmuntowicz donacis arbaregon en la riverbaseno de Biała (Blanka).

...

La 27-an de julio 1944 Bjalistokon liberigis de la germanoj Dua Belorusa Fronto de la Ruĝa Armeo. Dum la bataloj tiam estis detruitaj pli ol 75% urbaj konstruaĵoj. Dum la unuaj monatoj post la liberigo loĝis en Bjalistoko 40 mil homoj. Post 2 jaroj la urba loĝantaro kreskis al 47 mil, pro la enmigrado de poloj, forlasintaj la regionojn de Grodno kaj Vilniuso.

Post la Dua Mondmilito Bjalistoko denove fariĝis vojevodia urbo kaj la centro de scienco, ekonomio, kulturo de nord-orienta Pollando. La 1-an de januaro 1999, rezulte de la administra reformo, la iama privata urbo de Branicki fariĝis la ĉefurbo de nove kreita Podlaĥia Vojevodio.

Informo el la retpaĝaro de la Bjalistoka esperanto-societo. Legu pli pri la kristana kongreso kaj Bjalistoko ĉe *https://tinyurl.com/mryepf84*

**Ne forgesu aliĝi al la Kristana Kongreso 2023, 72a KELI-kongreso.**
Aliĝilo troviĝas en la antaŭa numero de Dia Regno 5/2022 aŭ prefere aliĝu rekte sur la retpaĝaro https://tinyurl.com/mryepf84

# KAVA-PECH (pli ol) 30-jara

En junio la eldonejo KAVA-PECH, kiu inter multaj aliaj libroj eldonis nian Biblion, povis kalkuli 30 jarojn da agado.

Inter la gastoj ĉe la jubileo estis Wolfram Rohloff kiu skribis la suban raporton.

## 30-jara jubileo de la eldonejo KAVA-PECH

Prago, la 9an de Junio 2022. Por festi la 30an jubileon de la eldonejo KAVA-PECH kunvenis ĉirkaŭ 100 personoj al solena akcepto en la sidejo de la Ĉeĥa Unuiĝo de Interpretistoj kaj Tradukistoj (JTP) proksime al la Jerusalema Sinagogo. La gastoj estis plejparte el Ĉeĥio, sed kelkaj ankaŭ venis el Slovakio kaj Germanio al Prago. Eble la duono el ĉiuj estis esperantlingvaj.



Petr Chrdle interparolas kun gastoj

En prelego la proprietulo Petr Chrdle skizis la historion de sia eldonejo: Tiu malgranda, sed ne nur inter esperantistoj renoma eldonejo naskiĝis el praktika bezono de lia novfondita entrepreno: Por la *Kongresová a Vzdělávací Agentura Petra Chrdleho* (Kongresa kaj kleriga agentejo de Petro Chrdle), mallonge KAVA-PECH, montriĝis oportune, publikigi mem la prelegojn de siaj klerigaj seminarioj per propra eldonejo, kiu rajtas disdoni internacian ISBN-numeron por siaj libroj. Pro tiu neceso naskiĝis nova eldonejo.

KAVA-PECH ĝis hodiaŭ eldonis 235 librojn, ĉefe en la ĉeĥa kaj en Esperanto, sed ankaŭ en aliaj lingvoj. Kvankam ĝi kompare kun similaj entreprenoj estas malgranda, KAVA-PECH tamen en decembro 2016 estis honorita de la Ĉeĥa Libro de Rekordoj (Česká kniha rekordů) kiel la eldonejo, kiu vendas siajn librojn al la plej multaj landoj (64) en ĉiuj daŭre loĝataj kontinentoj.



Ekspozicio de eldonitaj libroj.

Dum la solena akcepto Petr Chrdle dankis kaj prezentis kelkajn el siaj kunlaborintoj, ekzemple aŭtorojn, tradukistojn, ilustristojn. La praga kantistino Jolana Haan Smyčková per siaj kantoj en la ĉeĥa kaj Esperanto ornamis la kunvenon. Tiu finiĝis per bankedo kaj la ebleco trafoliumi kaj aĉeti aktualajn librojn de KAVA-PECH.

Ni ĝoju pri la sukceso de tiu eldonejo kaj malavare aĉetu ĝiajn librojn!

*Wolfram Rohloff*

# Informoj

## Atributoj de apostoloj kaj evangeliistoj

Aperis, en bona tempo antaŭ la jubileo de Kava-Pech, la libro Atributoj de apostoloj kaj evangeliistoj de Ágnes Ráczkevy-Eötvös. Temas pri prelego kaj artikol-serio nun en libroformo. Ĝi estas ankaŭ tradukita en la ĉeĥan lingvon de Oldřich Fischer.


Pri la libro estas skribite sur la retpaĝo de Kava-Pech:

Detala priskribo de atributoj de unuopaj apostoloj kaj evangeliistoj kompletigita je multaj ilustraĵoj. Temas pri utila helpilo ne nur por vizitantoj de preĝejoj, sed ankaŭ por scivolema turisto, ofte staranta antaŭ iu bildo aŭ statuo de sanktulo ne sciante, pri kiu temas.

Jen la vortoj de la aŭtorino:

Mi naskiĝis kaj kreskis en la familio, komunumo kaj tradicio de la hungara reformita eklezio.

Por mi la plej bela preĝejo estas tiu, en kiu mia avo predikis: granda salono en la unua etaĝo de domo en la centro de Budapest. Tie, kie sur la blankaj muroj troviĝas nur kelkaj citaĵoj el la Biblio kun geometriaj bildoj aŭ plantaj motivoj.



Maldekstre la esperanta eldono kaj dekstre la ĉeĥa traduko.

Mi memoras pri la surprizo dum la unua vizito en katolika preĝejo! La bildoj, la skulptaĵoj, la pentritaj fenestroj! La Biblio de malriĉuloj – diris al mi mia avino. La malriĉaj homoj antaŭ jarcentoj ne scipovis legi, pro tio oni rakontis la plej gravajn okazaĵojn de la vivo de Jesuo Kristo, sanktuloj, apostoloj per bildoj.

Ofte mi ne havis ideon, kiu estas sur la bildoj kaj kiel aliaj homoj povas tion scii? Poste mi lernis, ke pro la atributoj eblas ricevi respondon al tiu ĉi demando.

Mi komencis esplori tiun tre interesan temon kaj por ekumena kongreso mi preparis prelegon pri la atributoj de apostoloj kaj evangeliistoj. Kun ĝojo mi redaktis la tekston de la prelego por tiu ĉi libreto kaj kore mi invitas vin al interesa aventuro!

La libro haveblas ĉe Kava-Pech (kava-pech.cz) aŭ ĉe UEA (uea.org)

# Aperis jam la stel' matena

## DER MORGENSTERN IST AUFGEDRUNGEN




DER MORGENSTERN IST AUFGEDRUNGEN • EG 69, tie ankaŭ 4-voĉa • Altenberger Singebuch 6a eldono, Freiburg 1953, p. 9 • M: 15a jarcento, religie ĉe Daniel Rumpius (Daniel Rump, 1549 – ĉ. 1600) 1587 • 4-voĉa aranĝo (kaj el ĝi la akordoj): Michael Prætorius (1571-1621) en Musæ Sioniæ 1609 • germana T: ĉe Daniel Rumpius 1587, prilaborita de Otto Riethmüller (1889–1938) 1932 • E (rekte el Rump): Albrecht Kronenberger 2018-01-05